



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Francilingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

P. BABIN

Le Haut des Bourrellières

17, rue Romain-Rolland

85100 Le Château-d'Olonne

P.C.K. Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1998 — I

(JANUARO - FEBRUARO - MARTO)

Jarabono : 80 fkoj

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... la indianoj de Nordokcidenta Ameriko,



... kaj Paul Gauguin en Bretonio

KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

<u>REDAKCIA KOMITATO</u>	<u>ENHAVO</u>	Paĝo
Jeannine VINCENT	El Grésillon	1
26bis, rue de Milngavie	Esperanto tra la Mondo	2
FR-49150 BAUGE	Trans Pacifikon	3-5
	Gauguin en Bretonio	6-7
	La Sud-Francia Kanalo	8-9
	Vivo de Indianoj	10
	Kiam formikoj militas	11
	Ni distriĝu	12
	Corneille, Racine, Molière amis ŝin	13
	Por vis Distro	14
	La Vivo en Grésillon	15-16
Pierre BABIN		
17, rue Romain Rolland		
FR-85180 CHÂTEAU D'OLONNE		

EL GRESILLON

FONDUSO SEKURECO

Ĉar la plimulto el la donacintoj deziras resti anonimaj, ni ne aperigos donac-liston. Tamen niaj varmaj dankoj iras al ĉiuj geamikoj, kiuj sendis, laŭpove, grandan aŭ malgrandan sumon. Ĝis nun la monhelpe superas 50 000 frankojn. Espereble kiam venos la fakturoj la tuto de la donacoj estos plukreskinta.

Ankaŭ helpas nin via vizito en la Kulturdomo dum la venonta somero. Malgraŭ la neatendita granda elspezo nia programo de daŭra necesa modernigo ne devas esti longe bremsita. Via helpo, ne nur mona sed ankaŭ partoprena en la gvidado de staĝoj estas necesa. Ne nur malfermu viajn ĉekarojn sed ankaŭ kuspe faldu viajn manikojn. Antaŭdankojn.

INSTRUTREJNA SEMINARIO organizita de ILEI

Ĝi okazos dum du semajnoj inter la 20-a kaj la 31-a de julio. Dum la unua semajno, D-ro Charters prezentos la bazojn de la nunaj teorioj pri lingvolernado, kun partoprenigaj demonstroj de la rezultantaj metodologioj.

Dum la dua semajno, kiu estos sendependa de la unua por novaj partoprenantoj sed logika sinsekvo por la aliaj, D-roj Charters kaj Smidéliusz prezentos praktikajn alirojn al la instruado de Esperanto, de lecionplanado al novaj interesaj metodoj instrui kaj mezuri aŭskultokomprenon kaj parolkapablon, uzon de dramtekniko kaj video, kreon de materialoj.

ESPERANTO TRA LA MONDO

ĈE UNESKO: Okazis ŝanĝo de statuso por la plimulto de la asocioj, kiuj rilatas kun UNESKO; ili havis "konsultaj rilatoj"; De nun, ekzemple, UEA estos " en operaciaj rilatoj". Same por ILEI (Internacia Ligo de esperantistaj instruistoj). Malpli ol la duono de la asocioj, kiuj havis konsultajn rilatojn sukcesis havi la operacian statuson.

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCŬOJ: La Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) de San Marino, okazigas sian oficialan universitatan sudesojen en esperanto en Moskvo, fine de marto. La ekzamenoj por akiro de sciencaj gradoj estas publikaj. Aliflanke estos proponitaj samdate kursoj: sur proksimume abiturienta nivelo.

JUDA-ESPERANTA KULTURO: En Svdniko (Pollando), de la 23-a ĝis la 28-a de aŭgusto 1998, okazos la 17-a Internacia Literatura Forumo, pri la juda kulturo kaj ĝia kontribuo al la esperanta. La programo, kun prelegoj, renkontoj, prezento de poezio, teatraj spektakloj, koncertoj, filmoj, vizitoj, fotoekspozicio kaj Interkona Vespero kun kantoj kaj muziko estas aparte alloga kaj riĉa.

INSTITUTO IVO LAPENNA: S-ro Zaleski-Zamenhof, nepo de Ludoviko Zamenhof, konsentis esti protektanto de la Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna, fondita en Vieno lastan jaron. S-ro Carlo Minnaja rolos kiel prezidanto de la Instituto kreita por akceli la sciencajn esplorojn en esperanto. Starigita de la samnoma fondaĵo, stipendio estas atribuita al universitat-nivela disertacio (doktoriĝa, magistriĝa, licencia), kiu temas pri esperantologio aŭ pri esperanto en rilato kun interlingvistiko, ellaborita en la spirito de Zamenhof kaj Lapenna.

ESPERANTO-CENTRO EN BĴALISTOKO: La Fondumo Zamenhof en BĴALISTOKO alprenis du gravajn decidojn: fondo de Esperanto-Centro en akordo kun la lokaj aŭtoritatoj de la naskiĝa urbo de Zamenhof kaj la rekonstruo de la zamenhofa naskiĝdomo. La centro estos studejo kaj stimulejo de esperanto kaj de internacia, scienca, eduka, kultura kaj turisma interŝanĝo.

INSTRUISTOJ ! Ĉu vi jam notis ke en nia Kulturdomo Grésillon, de la 20-a ĝis la 31-a de julio, ILEI organizos instrutrejnajn seminarion? Tuj informiĝu ĉe la Kulturdomo.

TUTEŬROPAJ TELEVIDAJ ELSENDOJ: La esperantistoj kun televida kompetenteco estas invitataj rilati kun Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano, Italio, kiu post unua televida elsendo en esperanto, la 14-a de aprilo, en rilato kun privata komerca anteno, celas produkti originalajn programojn en esperanto.

EN BOSNIO: La esperantistoj de Katalunio decidis helpi la bosnian movadon, kaj "Bosnia Lilio", gazeto de la Esperanto-Ligo de Bosnio-Hercegovino estis lanĉita en Sabadell, Katalunio. Bela ekzemplo de interreta helpo.

EN BRITA UNIVERSITATO: Ekde lasta septembro, esperanto estas elekta fako por studentoj pri fremdaj lingvoj en la unua studjaro, en la universitato de Salford. Grava parto de la kurso koncernas la historiajn, sociajn kaj kulturajn aspektojn de la lingvo.

POR LA KONGRESO DE MONTEPELLIER prelegantoj estas serĉataj por la programo de prelegoj de junaj sciencistoj dum la junulara parto de la UK 1998. Skribu al Konrad Hinsén, Laboratoire de Dynamique Moléculaire, 41, Avenue des Martyrs, 38027, Grenoble Cedex 1, Francio.

KULTURAJ KONKURSOJ DE TEJO

TEJO lanĉis kulturajn konkursojn por 1998 kaj 1999. Temas pri desegnado por infanoj malpli ol 15-jaraj; satiroj, komiksoj kaj bildstrioj, videofilmoj. Informas: Miquel Gomez i Besos, Niddergerstr. 9, DE-50937 Köln, Germanio.

POR KOMERCI KUN ĈINIO: Interalie, kontaktaj komercaj kun Ĉinio eblas pere de la "Bulteno de Esperanta Komercio" de s-ro Wang Tiany, Shanxi Gangchang CN - 710043 XI'AN. Li disponas pri fakso kaj retadreso.

"JUNA AMIKO" 25-JARA: La esperanta gazeto por lernejoj "Juna Amiko" fariĝis 25-jara Gratulojn al la redaktoroj! Adreso: Géza Kurucz, Hitei u. 10, HU-6000 .

Kecskemét, Hungario.

TRANS PACIFIKON

Vi jam legis pri la preparoj de la transpacifika flosado de Kon Tiki. Jen nun kelkaj travivaĵoj de la aventuremuloj.

Kiam la maro ne estis tro sovaĝa, ni ofte forremis en la kaŭĉuka boato kaj fotografis. Mi ne forgesos la unuan fojon, kiam la maro estis tiel trankvila, ke du viroj emis meti la balonsimilan malgrandan aĵon sur la akvon por fari ekskurseton sur la ondoj. Apenaŭ for de la flosilo ili formetis la malgrandajn remilojn kaj komencis ridegi. Kaj dum la ondegoj portis ilin for kaj ili aperis—malaperis malantaŭ la ondoj, ili hurle ridis sur la dezerta Pacifiko, ĉiujfoje kiam ili ekvidis nin. Ni ĉirkaŭrigardis kun miksitaj sentoj, ne vidante ion strangan krom niaj propraj hirtaj kaj barabaj vizaĝoj, sed la du tie en la boato devus jam esti al kutimiĝintaj al ili, kaj ni komencis suspekti, ke ili ambaŭ perdis la prudenton. Eble sunfrapo. Pro rido la du viroj nur per granda peno sukcesis reveni al Kon-Tiki, kaj ĝemantaj pro rido kaj kun larmoj en la okuloj ili petis nin elremi kaj mem rigardi. Du el ni saltis en la dancantan boateton, kaj tuj ondo kaptis kaj levis nin for. Ni devis kiel eble plej baldaŭ remi returne al la flosilo por trankviligi la du lastajn, kiuj ankoraŭ ne estis remintaj, ĉar ili kredis, ke ni ĉiuj tute frenezigiĝis.

Estis ni mem kaj nia propra fiera veturilo, kiu donis al ni komikan kaj frenezan impreson, kiam ni la unuan fojon vidis la tuton el ioma distanco. Ni neniam antaŭe sur la maro rigardis nin mem de ekstere. La trunko malaperis post la plej malgrandaj ondoj, kaj kiam ni entute vidis ion, tio estis malalta kabano kun larĝa pordotruo kaj hirta folitegmento, kiu suprenvenis inter la ondoj. Ĝi aspektis tute kiel malnova norvega fojnejo drivanta senhelpe sur la vasta maro, ventoskuita fojnejo plena de sunbrunigitaj kaj barabaj vagabondoj. Se iu estus veninta malantaŭ ni padelante en bankuvo, tio estus vekinta ĉe ni la saman spontanegan ridemon. Eĉ ordinara ŝvelonduo ruliĝis supren ĝis duone de la kajuto, kaj ŝajnis, ke ili senbare verŝiĝos en la nefermitan fojnejpordon, kie la barabaj viroj kuŝas gapante. Sed jen la malfortika kabano denove flosas sur la akvo, kaj la vagabondoj kuŝas tie same

sekaj, hirtaj kaj netuŝitaj kiel antaŭe. Se granda ondo venis, eble malaperis post la akvomonto la kabano, la velo kaj la tuta masto, sed same certe la kabano kun la vagabondoj post unu momento denove estis tie. Aspektis danĝere, kaj ni ne komprenis, ke ĉio tiel bone sukcesis sur la veturilo.

La postan fojon, kiam ni elremis por priridi nin mem, ni preskaŭ akcidentis. La vento kaj la fluo estis pli fortaj ol ni supozis, kaj Kon-Tiki iris pli rapide ol ni kalkulis. Ni devis remi por nia vivo por reatingi la petolan floson, kiu ne povis halti por atendi kaj tute ne turni sin kaj reiri. Eĉ kiam la viroj sur Kon-Tiki malhisas la velon, la vento sur la kajuto ŝovis la balzafloson okcidenten same rapide kiel ni povis postremi en la dancanta ronda boateto kun la ludilpadoj. Nur unu penso estis en la kapo de ĉiuj: ni devas ne disiĝi. Estis malagrablaj minutoj sur la maro antaŭ ol ni atingis la kureman floson kaj reunigiĝis kun la aliaj sur la trunko, kiuj estis nia hejmo. Post tiu tago estis severe malpermesite uzi la boaton sen longa ŝnuro fiksita al la flosopuĝo, por ke la flosuloj povu retiri ĝin se necese.

.....La fendoplena bambua dometo havis mirindan psikologian influon al ni. Ĝi estis 8x14 fuojn, kaj por malgrandigi la ventan premon ĝi estis konstruita tiom malalta, ke ni ne povis stari rektaj en ĝi. Vandoj kaj tegmento estis kunligitaj per fortaj bambuaj kanoj, kovritaj per fortika plektaĵo el fendita bambuo. La verdaj kaj flavaj franĝoj pendantaj de la tegmento donis tute alian ripozon por la okuloj ol blankfarbita vando, kaj malgraŭ tio ke la dekstra longvando estis trione ne fermita kaj tegmento kaj vandoj permesis al la suno kaj la luno tralumi, ĉi tiu primitiva kaverno donis pli da sekursento ol blankfarbitaj vandoj kaj fermitaj ŝipfenestroj donus dum samaj kondiĉoj. Ni provis trovi la kaŭzon de tiu stranga fakto kaj venis al la sekvanta rezulto. Nia propra konscio tute ne estis al kutimiĝinta kombini palmkovritan bambuadometon kun vojaĝo sur la maro. Ne ekzistis ia natura harmonio inter la granda, ruliĝanta maro, kaj la ventotralasa palmkabano, kiu ĉirkaŭflosis inter la ondoj. Tial aŭ la dometo ŝajnus mislokita inter la ondoj, aŭ la ondoj ŝajnus mislokita ĉirkaŭ la kabanvandoj. Tio lasta estis fakto por ni dum ni estis sur la flosilo. Vidate el la boato la ondoj kaj la dometo ŝanĝis rolojn. La fakto, ke la balzatrunkoj ĉiam floris sur la

ondoj kiel mevo kaj ke la akvo trafuis malantaŭe, donis al ni neŝanĝeblan fidon al la seka loko meze sur la flosa, kie la dometo staris. Ju pli longe la vojaĝo daŭris, des pli sekuraj ni sentis nin en nia hejmea kaverna, kaj ni rigardis la altajn ondojn, kiuj dancis ekster la pordotruo, kvazaŭ imponan filmon, kiu tute ne minacas nin. La faŭko en la vando estis nur kvin futojn de la flosrando kaj unu kaj duonon futon super la akvo, sed kiam ni rampis tra la pordo, ni sentis kvazaŭ ni vojaĝus multajn mejlojn for de la maro kaj loĝus en ĝangalo ĝejoj ŝirmita kontraŭ la maraj danĝeroj. Tie ni povis kuŝi dorse kaj rigardi la strangan tegmenton, kiu moviĝis kvazaŭ branĉoj en vento, dum ni ĝuis la ĝangalodoron de malseka ligno, bambuo kaj velkintaj palmfolioj....

...Kiam ni vidis la solan floson, ni povis bone imagi la tutan aron da tiaj veturiloj irantaj dise ĉirkaŭ la horizonto por pligrandigi la ŝancon trovi teron, kiam la unuaj homoj travelis ĉi tiun maron. La inkao Tupak Yupanqui, kiu venkis kaj Ekvadoron kaj Peruan, tuj antaŭ la veno de la hispanoj veturis kun miloj da viroj per aro da balzaflosoj sur la maron por serĉi insulojn en Pacifiko, pri kiuj la onidiroj rakontis. Li trovis du insulojn, kiujn kelkaj opinias esti la Galapagosinsuloj, kaj post okmonata foresto li sukcesis kun siaj multnombraj remistoj reveni al Ekvadoro. Kon Tiki kaj liaj amikoj plurajn jarcentojn pli frue certe velis samformacie, sed ili ne havis kaŭzon por provi reiri.

Resaltinte sur la floson ni ofte sidiĝis sur la bambua ferdeko ĉirkaŭ la lanterno, parolante pri la marveturantoj el Peruo, kiuj spertis ĉion tion dekkvin jarcentojn antaŭ ni. La lanterno ĵetis gigantombron de barabaj viroj sur la velon, kaj ni pensis pri la blankaj barabaj viroj el Peruo, kiujn ni povis sekvi en la mitologio kaj la arkitekturo la tutan vojon el Meksiko al Mez-Ameriko kaj en la nordokcidentan regionon de Sud-Ameriko ĝis en Peruo, kie la mistera kulturo malaperis kvazaŭ sorĉe antaŭ la veno de la inkaoj kaj same subite reaperis sur la solecaj insuloj, al kiuj ni nun alproksimiĝis...Ni ne plu opiniis, ke la maro perfekte izolais, Pluraj esploristoj kun gravaj argumentoj asertis, ke la grandaj indian-kulturoj, de la aztekoj en Meksiko ĝis la kulturoj en Peruo, aperis post subitaj impulsoj, kiuj de oriento venis trans la maron, dum ĉiuj ordinaraj indiantriboj ja estas aziaj

ĉasistaj kaj fiŝistaj popoloj, kiuj, dum 20.000 jaroj aŭ eĉ pli, estas venintaj en Amerikon el Siberio....

....Ni ne plu havis la unuan respekton al la ondoj kaj al la maro. Ni konis ilin kaj ilian rilaton al ni sur la flosa. Eĉ la ŝarkoj fariĝis parto de la ĉiutaga vivo; ni konis ilin kaj iliajn ordinaraĵajn reagojn. Ni ne plu uzis la manharpunon, kaj ni eĉ ne forlasis la flosorandon, kiam ŝarko venis apud ni. Kontraŭe, ni prefere per la manoj kaptis ĝian dorsnaĝilon, kiam ĝi tute trankvile preterglitis laŭ la trunkoj. Tio fine fariĝis tute nova sporto, tirkonkurso kun ŝarko sen fiŝfaden. Ni komencis modeste. Facile ni kaptis pli multe da korifenoj ol ni povis manĝi. Por havi popularan amuzon sen malŝpari la manĝaĵon ni ekhavis la ideon fiŝkapti sen hoko, por komuna plezuro al la korifenoj kaj al ni mem. Ni ligis flugfiŝon al ŝnuro kaj trenis ĝin sur la surfaco. La korifenoj venis al la surfaco kaj kaptis la fiŝon. Ni tiris ĉiu en sia direkto kaj havis grandan cirkon, ĉar se unu fiŝo perdis la kapton, alia tuj venis. Ni ricevis la amuzon kaj la korifenoj la fiŝon. Poste ni komencis la saman ludon kun la ŝarkoj. Ni ligis fiŝpecon al ŝnuro aŭ ofte ŝtofsaketon kun restoj de la tagmanĝo. Anstataŭ turni la dorson malsupren, la ŝarko metis la nazon super la akvon naĝante antaŭen kun malfermita buŝego por gluti la manĝaĵon. Ni ektiris la ŝnuron ĝuste kiam la ŝarko volis gluti, kaj kun nedireble naŭva kaj pacienca aspekto ĝi naĝis pluen kaj denove malfermis la buŝegon por la manĝaĵo, kiu forsaltis ĉiufoje, kiam ĝi volis kapti ĝin. Fine ĝi venis apud la trunkojn kaj levis sin kiel petanta hundo al la manĝaĵo, kiu pendis super ĝia nazo. Estis kvazaŭ doni manĝaĵon al hipopotamo en zoologia ĝardeno kaj iun tagon, en la fino de julio post tri monatoj sur la flosa, mi skribis en la taglibro: "Ni amike traktis la ŝarkon, kiu akompanis nin hodiaŭ. Dum la tagmanĝo ni donis al ĝi restojn, kiujn ni metis rekte en ĝian buŝegon. Ĝi similas al duone danĝera kaj duone amika hundo, kiam ĝi naĝas apud ni. Oni devas konfesi, ke la ŝarkoj aspektas tute simpatiaj, kiam oni mem ne estas en iliaj buŝegoj. Almenaŭ ni opinias, ke ili estas agrabla akompano escepte kiam ni banas nin."

Bambustango kun saketo da ŝarko-manĝaĵo iun tagon kuŝis preta sur la flosrando, sed granda ondo forprenis ĝin. La bambua stango floris jam ducent metrojn

malantaŭ la flosa, kiam ĝi subite stariĝis rekte supren en la akvo kaj per si mem venis rapide post la flosa, kvazaŭ ĝi intencus reiri al sia antaŭa loko. Kiam la stango venis pli proksimen ni ekvidis dekfutatan ŝarkon, kiu naĝis sub ĝi dum la stango staris en la ondoj, kiel periskopo. La ŝarko glutis la manĝaĵsaketon sen tramordi la ŝnuron. La stango baldaŭ atingis nin kaj trankvile preterpasis kaj malaperis antaŭe. Eĉ se ni iom post iom ŝanĝis nian opinion pri la ŝarko, malaperis neniam la respekto al la kvin-ses vicoj da razilakraj dentoj, kiuj minacis en la grandega buŝo.

Iun tagon Knut faris senintencan naĝon kune kun ŝarko. Estis neniam permesite naĝi for de la flosa, tiel pro la flosa rapido, kiel pro la ŝarkoj. Sed iun tagon estis neordinare trankvile. Ni ĵus forigis la ŝarkojn kaj permesoj estis donataj, ke oni povos fari rapidan banon en la maro. Knut kapsaltis en la akvon kaj glitis iom malproksimen, antaŭ ol li revenis al la surfaco por naĝi returne. En la sama momento ni ekvidis de la masto korifenon, pli grandan ol li mem, kiu venis supren malantaŭ li, pli

profunde. Ni krie avertis kiel eble plej trankvile por ne timigi, kaj Knut ĵetis sin al la flosrando. Sed la korifeno sube apartenis al ankoraŭ pli lerta naĝanto, kiu rapide proksimiĝis al Knut. Ili atingis la floson samtempe. Dum Knut grimpis sur la floson, sesfuta ŝarko preterglitis sub lia ventro kaj haltis apud la flosrando. Ni donis al ĝi bongustan korifenekapon por danki pro tio, ke ĝi ne mordis.

Cetere la flaro pli ol la vido vekas la rabemon de la ŝarkoj. Foje ni sidis kun la piedoj en la akvo por provi ilin, kaj ili venis ĝis distanco de du, tri futoj por nur trankvile turni la voston al ni. Sed se estis eĉ la plej eta sangmakulo sur la akvo, kiel okazis kiam ni preparis fiŝon, tiam la ŝarknaĝiloj komencis moviĝi kaj ili subite aperis kvazaŭ viandmuŝoj. Se ni elĵetis internajojn de ŝarkoj, ili tute freneziĝis kaj ĉirkaŭnaĝis blindaj pro kolero. Ili sovaĝe glutis la hepaton de sia propra frato, kaj se ni metis la piedon en la maron, ili venis kiel raketoj kaj eĉ mordis la trunkojn tie, kie la piedo ĵus estis. Ŝarko kaj ŝarko estas du aferoj, ĉar la ŝarko estas tute regata de sia propra animstato.

La lasta stadio de nia kunesto kun la ŝarkoj estis, ke ni komencis tiri iliajn vostojn. Oni diras ke estas malnobla sporto

tiri voston de besto, sed tion oni diras, ĉar oni ne provis tiri ŝarkovoston. Tio estis vere freŝiga sporto. Por povi kapti la voston de la ŝarko ni devis antaŭe doni al ĝi frandaĵon. Ĝi volonte suprenigis la kapon alte super la akvon por ricevi ĝin. Ordinare ĝi ricevis la manĝaĵon pendantan de ŝnuro, ĉar se oni nur unufoje donis manĝaĵon al ŝarko per la mano, tio ne plu ŝajnas amuza. Se oni donas manĝaĵon al hundoj aŭ malsovaĝaj ursoj per la mano, ili mordas la viandpecon, ŝiras kaj tiras ĝin ĝis ili ricevas parton aŭ la tutan pecon. Sed se oni tenas grandan korifenon je sekura distanco de la ŝarkokapo, la ŝarko alvenas kaj fermas la buŝegon, kaj sen sento de movo la duono de la fiŝo estas for kaj oni mem sidas kun la vosto en la manoj. Estis al ni granda peno partigi korifenon per tranĉilo, sed dum parteto de sekundo la ŝarko nerimarkeble tranĉis spinon kaj ĉion kiel viandeja tranĉmaŝino, per rapida flankenmovo de la triangulaj dentoj. Kiam la ŝarko trankvile turniĝis por ree profundigi, la vosto flirts en la akvosurfaco kaj estis facile kaptebla. La ŝarkhaŭto estis kiel bona sablopapero, kaj apud la supra vostopinto estis kaveto, kiu estis bona tenilo. Se ni bone tenis tie, ne estis la plej eta ŝanco, ke ni perdos ĝin. Poste ni devis ektiri, antaŭ ol la ŝarko komprenis la situacion, kaj treni kiel eble plej multe de la vosto sur la trunkojn. Dum unu sekundo aŭ du la ŝarko nenion komprenis; poste ĝi komencis senefike balanci la antaŭkorpon, ĉar sen helpo de la vosto la ŝarko ne povas iri antaŭen. La ceteraj naĝiloj servas nur por ekvilibro kaj direktado. Post kelkaj senesperaj movetoj, dum kiuj ni devis firme teni ĝin, la surprizita ŝarko tute senkuraĝiĝis kaj inertiĝis. Estis tempo tiri per la tuta forto. Ni ordinare sukcesis nur duone eltiri la pezan fiŝon sed tiam la ŝarko vekiĝis kaj faris mem la ceteron. Per fortaj movoj ĝi mem ĵetis la kapon sur la trunkojn, kaj tiam ni devis plenforte ektiri kaj forsalti tre rapide, se ni volis savi niajn piedojn. Ĉar nun la ŝarko ne estis amika.... Foje la militdanco finiĝis tiel, ke la ŝarko okaze reiris en la maron, kie ĝi por ĉiam malaperis post la hontiga similigo, sed ordinare ĝi senefike ĵetis sin sur la sama loko en la poupo.

GAUGUIN

EN BRETONIO

Gauguin laboris en banko, kiel likvid-danto. Ĉar lia direktoro permesis al li iom spekulii li posedis belan domon kun parko. Li kolektis pentraĵojn de la tiam nomitaj "malbenitoj": Cezanne, Renoir, Monet, Pissarro, Sisley, Guillaumin, Manet. Oni respektis lin. Vespere li rigardis la ŝatatajn pentraĵojn, eniris sian laborejon kaj ŝlosis la pordon. De tempo al tempo li petis la servistino Justine pozi nuda. Justine konsentis ĉar ŝi jam laboris ĉe la pentristo Delacroix. Sed la edzino, Mette, filino de luterana juĝisto dana estis ŝokita. Ŝi ankaŭ plendis, ke ili ne sufiĉe ofte vizitas aŭ akceptas geamikojn en sia bele, riĉe meblita domo. La edzo nur vizitis muzeojn, laboris en la Akademio Colarossi, asimilis la teknikojn de pentrado.

Projekto obsedis lin. Li fariĝis nervoza. Lia edzino ne konsciis pri la ŝanĝoj. En 1883, iun matenon, ŝi miris, ke li ne ellitiĝis kiel kutime. "Mi ne plu iros al la banko. Mi demisiis. Mi volas pentri, plentempe." Liaj amikoj intervenis. Pissarro diris, ke estas nur frenezaĵo, sed la respondo estis: "Mi volas vivi nur per pentrado. Neniu en la familio kaj amikaro komprenis, ke mortis la bankisto kaj naskiĝis la pentristo". Mette naskis kvinan infanon, nomitan Paul por montri, ke "la patrino fidis al la patro". La familio forlasas Parizon, iras al Kopenhago. La gepatroj kaj gefratoj de Mette tute ne elkore akceptas Gauguin kaj la infanojn. Mette estas devigata instrui pianludon. Gauguin disponas pri malgranda malhela ĉambro kaj, pro manko de modelo, pentras sin mem. Ekspozicio fiaskas. "Kelkaj bigotinoj subfosas mian laboron ĉar mi estas malpiulo".


En 1885 Gauguin revenas al Parizo, sen mono, sen hejmo, sen mebloj, sen laboro sed li ne malkuraĝiĝas. Li trovas loĝejon en kaduka domo, sed sur la muroj de la apartamento pendas "La sunfloroj" de Van Gogh kaj kelkaj pentraĵoj de Cézanne. En 1886, gajninte iom da mono per afiŝ-algluado, Gauguin pensas pri nova foriro, "plia ekiro al sukceso". Kien? Al Bretonio

kie estas malplikoste vivoteni. Iu amiko parolis pri gastejo en Pont-Aven. La estrino volonte konsentis kredito al la artistoj. Tie li alvenis en junio 1886 kun alia pentristo, kiu pentris vestita per redingoto, nudpieda en ligno-ŝuoj kaj kun japana ĉapelo surkape. Gauguin serĉis model-virinojn sed nur unu kon-sentis pozi nuda.

Lia plej ŝatata gasteja kamarado estis Charles Laval, impresionisto. Poste alvenis tri aliaj pentristoj. Vespere oni multe kaj fortvoĉe diskutis en la gastejo. La voĉo de Gauguin aŭdiĝis: "Mi sintezas, ĉiam. Mi utiligas nur la prismajn kolorojn. Mi apud-metas ilin. Mi nur malofte miksas ilin. Tiel mi akiras pli da lumeco." Sed en la leteroj al sia edzino li plendis: "Mi ne scias, kien mi iras. Mi kredite vivtenas. Ĉiam mon-malfacilaĵojn. Mi ŝatus vidi la finon de la tunelo". En Kopenhago Mette estis malsana. Ŝi estis trafita de mam-tumoro. Felice la tumorino iom post iom malaperis.

Daŭre staris la problemoj: kiamaniere vivi por pentrado, kiam oni ne sukcesas vivteni per pentrado? Du jarojn poste estiĝis la "skolo de Pont-Aven", kies anoj nomis la ortodoksajn kolegojn "filistoj". La skolaroj manĝis aparte, en malgranda ĉambro, kiel pestuloj.

La loĝantoj de Pont-Aven kaj la regiono ne ŝatis ilin. La paroĥestro de Pont-Aven, kaj poste tiu de apuda urbeto rifuzis iun pentraĵon, "La Flava Kristo", kiun Gauguin deziris donaci al ili. Li faris



Le Christ Jaune. Toile de Gauguin en Bretagne.

portreton de la edzino de la urbestro de Pont-Aven. La sinjorino plendis ĉar "dum li laboris, li malpermesis al mi ekrigardi la pentraĵon dirante, ke oni vidas nenion dum la laboro". Okaze de la montrado ekestis akraj mokoĵoj, eĉ bataloj. Kompreneble la sinjorino rifuzis la portreton...kion ŝi bedaŭris post kelkaj jaroj. La portreto estis aĉetita de Degas kaj ĝi nun estas en la muzeo Louvres en Parizo sub la titolo "Bela Anĝelina".

La reputacio de tiuj "diboĉuloj" allogis la turistojn. Tro. Gauguin migris al Le Pouldu, proksima ĉemarborda vilaĝo. Li estis akompanata de Meier de Haan, nederlanda rufharulo, riĉa fabrikanto de biskvitoj, kiu lasis la fabrikon al siaj fratoj kontraŭ ĉiujara rento. La estrino de la gastejo en Le Pouldu havis la nomon Marie Henry sed estis kromnomata Pup-Maria pro sia freŝa, infaneca vizaĝo. Tiam komenciĝis periodo de granda laboro. La vivo estis kronometre aranĝita sed okazis ke, dumnokte, kun Meier de Haan, ili envolvis sin en blankaj littukoj kaj petole kuris ĉirkaŭ la komuna lavejo, dirante, ke ili estas fantom-lavistinoj prisorĉantaj la preterpasantojn. La pentraĵoj de Gauguin malbone vendiĝis kaj Meier provizis lian vivtenon. Amo ĉesigis tiun periodon de la vivo de la pentristo: li amis Pup-Maria-n; ŝi amis Meier !

En 1894, post sia unua restado en Tahiti, Gauguin revenas pilgrime al Bretonio. Li venas kun Annah. Kiu estis Annah ? La loĝantoj de Le Pouldu nomis ŝin "la negrino". Fakte Gauguin revenis al Parizo kun ŝi en 1893. Ŝi promenas laŭ la stratoj de Concarneau kun Gauguin kaj paro de amikoj, Armand Seguin kaj lia edzino. Surŝulte Annah portas Taoo-n, junan simiion. Subite aŭdiĝas krioj de infanoj: "Hu ! Hu ! Vidu la nigrulinon !" Mokvortoj, grimacoj adresiĝas al la grupeto. Kelkaj ŝtonetoj ekflugas; Seguin kaptas unu el la infanoj, pinĉas lian oreton. Ekkrioj. Viroj kolektiĝas ĉirkaŭ la fremda grupeto. La patro de la krianta infano eliras el apuda trinkejo kun alia maristo. Oni interbatalas. Armand Seguin falas en la akvon. Gauguin frontas, uzas sian bastonon, frapas la kvar atakantojn. Annah ploras. La popolamaseto kriadas. Gauguin falas teren kaj estas trafita de piedbatoj. Lia dekstra maleolo estas frakasita. Dum unu monato kaj duono li ne povos paŝi. La monkompenso atribui-

ita de la tribunalo ne kovris eĉ la duonon de la elspezoj. " Mi lamas, mi ne povas longtempe paŝi por pentri pejzaĝojn. Dum du monatoj mi glutis morfinpilolojn. Ĉiutage nun mi trinkas alkoholon, kiu ebligas min dormi kvar horojn en la nokto".

Tiam Gauguin provas vendi siajn pentraĵojn. Sed la organizita publika vendo alportas al li nur 464 frankojn. Li skribas al sia edzino: "Mi povas vivi nur en la sunlumo. Mi foriras al Oceanio, kie mi finos miajn vivjarojn for de la stultuloj."


Lastfoje, iun vesperon, antaŭ ol foriri, li kunvenigas siajn amikojn. Ili trinkas rumon, kantas. Li disdonas kelkajn el siaj ŝatataj havaĵoj: bastonon, tabakujon, mozaikojn, kiujn li mem faris. Post la foriro de la amikoj li ne povas dormi. Li eliras kaj promenas sur la trotuaroj, renkontas junan prostituinon. Li sekvas ŝin...EL Eŭropo li kunportos sifilison...

El "Les Maudits" eld. Denoël

MARIJA P. ANGELOVA

PENSO PRI GALANTO


*De jaro al jaro en nia ĝardeno
galanto radikas profunde en grundo.
Mi miras de kie ĝi fortojn eltiras
tre dikajn tavolojn da grundo trabori
per pinto tre fajna kaj frue ekflori
sur neĝo glacia. Se homo centonon
da fortoj de tiuj de l'floro ekuzus,
li farus koloson de faroj utilaj.*



VIZITINDA OKAZE DE LA 83-a UEA-KONGRESO

LA SUD-FRANCIA KANALO

(protektita de Ukesko same kiel, en la sama regiono, Pont-du-Gard, giganta akvedukto, kaj la fortigita urbo Carcassonne.)



De longa tempo ekzistis tiu ideo: komuniki Atlantikon kun Mediteraneo per kanalo. Sed ĝis la 17-a jarcento, obstaklis la topografia situacio: la 194 metrojn alta "Sojlo de Naurouze" (pr. Noruz), akvodislimo, kiu apartigas la mediteranean kaj akvitanan basenojn.


Pierre-Paul Riquet (pr. Rike), regiona barono, riĉigita dank'al la imposto super la salo, trovis solvon: kolekti la akvojn de la najbara "Nigra Monto", konduki ilin per kanaletoj ĝis artefarita baseno en Naurouze. Tiu akvo ebligis la konstruon de la "Kanalo inter la 2 Maroj" kaj ĝiaj kluzoj. La konstruado, apogita de Colbert (pr. Kolber) ministro de la reĝo Ludoviko la XIV-a, daŭris 15 jarojn (1666-1681), provizante laboron al 1000-12000 homoj.

Post la morto de Riquet, kiu dediĉis al la entrepreno sian tutan personan riĉaĵon, la laboro estis perfektigita de Vauban (pr. Voban), arma inĝeniero, kiu adaptis la kanalon ankaŭ al militaj postuloj.

La kanalo estas 254 kilometrojn longa, de Tuluzo ĝis la haveneto Les Onglous, okcidente de la laguno Thau (pr. To). En la 19-a jarcento ĝi estis kompletigita per du kanaloj: ĝis la rivero Garonne, do ĝis Atlantiko, kaj ĝis la rivero Rhône. Sed jam venis konkurenco de fervojo; krome, ĝiaj dimensioj ne ebligas ĝian utiligon fare de modernaj boatoj: la trafiko (varoj kaj vojaĝantoj) malaltiĝis. Tamen, de ĉirkaŭ 25 jaroj vigliĝas nova trafiko: nome "turisma"; efektive vi povas lui malrapidajn kaj adaptitajn boatetojn.

Do, ŝipante sur ĝi aŭ pasante sur la haŭlovojo, plej ofte sub la ombro de la diversaj arboj plantitaj por firmigi la kanal-bordojn, vi povos ĝui tiun promenadon kaj admiri la diversajn teknikajn laboraĵojn: 60 kluzojn, 130 kanal-pontojn kaj tunelon.


Fine de la vizito ni grimpu sur la monteton por vidi la restaĵojn de la antikva vilaĝo Enserune, kaj ĝui unikan vidaĵon.



Por sekigi la kampojn fosaĵoj drenas
la akvojn ĝis la centro, de kie ili alfluas
per subtera kanalo.



En Fontanes, 9 kluzoj kreas impreson
de kaskadoj (longeco: 300 metrojn- dis-
niveleco: 22 metrojn).



Kanalponto, kiu transsaltas la valon.
de la riverego ORB.

VIVO DE INDIANOJ

EN NORDOKCIDENTA AMERIKO

La ceremonio "potlatch" (potlaĉ) estas sufiĉe vaste konata kvankam la detaloj restas al multaj amerikanoj malprecizaj, Temis pri socia ceremonio okaze de kiu iu ĉefo, kaj lia grupo, akceptis invititojn kaj disdonis aŭ detruis parton de siaj havaĵoj por pluaserti sian rangon kaj firmigi siajn privilegiojn, aŭ por investi aliajn per blazonoj, nomoj aŭ rajtoj. Kiam mortis iu ĉefo, lia posteulo organizis potlaĉon omaĝe al la mortinto. Estis elnomitaj la povoj kaj honoroj kiujn li heredis; lia blazono estis elmontrita kaj okazis, ke oni drame elvokis la rilatojn de liaj prapatroj kun diaj bestoj. La invititoj atestis la pretendojn de la nova ĉefo; ili ricevis manĝaĵojn kaj donacojn. Ju pli altranga estis la ĉefo des pli multaj estis la malŝparaĵoj. Por diskonigi heredanton, aŭ kiam la heredaĵo venis de la patrina branĉo oni organizis potlaĉon; iuj blazonoj, iuj prerogativoj estis konfiditaj al la bofilo, kiu fariĝis depontenanto favore al siaj infanoj al kiuj siatempe li transdonos ilin okaze de nova potlaĉo. Ĉe kelkaj triboj, kiam okazis al li io humiliga, la ĉefo organizis potlaĉon por reakiri prestiĝon. Ankaŭ okazis, ke iuj profitis de potlaĉo por aĉeti la rangon, kiun ili celis.

Kiam du grupoj decidis unuiĝi, kiu estos la ĉefo ? Sekvis terura konkurado. Iu ĉefo organizis potlaĉon kontraŭ sia rivalo; li disdonis aŭ detruis grandan kvanton da siaj riĉaĵoj, pli ol la alia kapablas amasigi. Li bruligis valorajn kovrilojn, detruis kuprofoliojn aŭ dispecigis ilin, eĉ mortigis unu aŭ du sklavojn. La dua ĉefo tiam vokis siajn tribanojn kaj ili kune klopodis por superi la alian. Oni prunteprenis de fremduloj varojn, redonotajn post unu jaro, kun interezo. Post pluraj potlaĉoj unu el la ĉefoj devis rezigni kaj estis konsiderata malsuperulo. Iom post iom tiu tradicio fariĝis ridinda ĉar, kiam la Indianoj de tiu regiono riĉiĝis pro felo-komercado, abundegaj stokoj de feloj amasiĝis nur cele al ruinigo de la aliaj. Fine potlaĉoj estis nur spektakloj ĉar la du kontraŭuloj interkonsentis sekrete.

Ĉe la nordokcidenta marbordo ne ekzistis agrokulturo, krom kelkaj tabakokampoj. Facile troveblaj estis diversaj beroj, ameloriĉaj bulboj, glanoj. La ĉasado de damaoj, ursoj, montarŝafoj, alkoj, migrantaj birdoj estis fruktodona. Sed ĝi estis ankaŭ luksa kaj danĝera sporto. Plej ofte oni ĉasis la montarŝafojn ne facile ekvideblajn (eĉ nun tra lorno!), ĉar ili vivas tre izolitaj. Unu aŭ pluraj viroj alproksimiĝis kaŝe al la bestoj kaj lasis sian proksimiĝon konata nur por devigi la kapron iri al antaŭvidita favora loko, kie ĝi estis mortigata per ĵetlanko. Ĉiujn sekretojn de tia ĉasado heredis nur la ĉefoj de la tribo.

Multe pli riĉa je nutraĵoj estis la maro. Kvin specoj de salmoj almonte naĝis en la riveroj. En la maro oni kaptis ankaŭ haringojn, osmerojn kaj kandelfiŝojn (fiŝojn, kiuj entenas tiom da oleo, ke meŝo tra iranta ilin brulas, kiel kandelo). La Indianoj lernis konservado-arton kaj ne plu estis devigataj konstante migri. por ĉasi. Ili ankaŭ ĉasis marmamulojn: senfelajn fokojn, marporkojn, marleonojn kaj balenojn. Sed ankaŭ prerogativo de la ĉefoj estis balenĉasado. Ĝi postulis grandan lertecon pri boatfabrikado kaj navigado. Plej ofte tiuj boatoj estis pli ol 15-metrojn longaj kaj tre stabilaĵ. La ekipaĵo estis multekosta; la riĉoj estis malsimplaj. La ĉefo zorgis pri la harpuno. La ŝnurego, kun siaj kvar flosiloj, devis disvolviĝi rapide kaj senhalte. Estis do necese zorge atenti pri ĝiavolvado en la boato. La harpuno estis pezega. La boato iris laŭ la maldekstra flanko de la baleno kaj venis sufiĉe proksime por ebligi fortan enfrapon. Tuj la boatanaro plenforte pagajis por eviti eventualan kolizion kun la baleno. Foje dua boato troviĝis ne malproksime kaj la estro de tiu dua boato, ĝenerale familiano de la tribestro, havis la honoron frapi per dua harpuno. Iom post iom la fortoj de la besto elĉerpiĝis. Jam oni utiligis lancon por tranĉi la vosto-tendenojn. Finfine oni frapis la balenon en la koron. Dum tiu batalo la besto kaj la boatoj alproksimiĝis al la marbordo, kie senpacience atendis la tribanoj.

El "Histoire des Indiens" (O. La Farge)

KIAM FORMIKOJ

MILITAS

En la antikvaj tempoj ekzistis du tipoj de homoj: la nomadaj ĉasistoj kaj la malnomadaj bredistoj.. Similajn tipojn ni retrovas ĉe la formikoj. Cetere la divers-eco de la aktivaĵoj de la formikoj, ilia persista laborado, la saĝa dispartigo de la laboro inter la diversaj kastoj pensigis, ke iliaj diversaj socioj estas inteligente organizitaj. Ili kondukas kvazaŭ ili estus kapablaj rezoni, kiam ili fakte saĝe obeas superan formon de instinkto.

Oni ĝenerale konstatas, ke la karnovoraj formikoj pli facile adaptiĝas kaj pli rapide elturniĝas ĉe neatenditaj cirkonstancoj; eble ĉar ili kutimas rapide reagi, kiam ili postkuras kaj kaptas predaĵon. Detale observi la vivon de ĉasistaj formikoj portantaj predaĵon estas fascine. Ĝenerale la portantoj paŝas duope; unu tiras la korpon de la predaĵo dum la alia puŝas aŭ levas ĝin. Se la duopo deflankiĝas ĝi rapide revenas al la ĝusta vojo. Okazas, ke la duopo fariĝas triopo. Tiukaze unu tiras kaj du puŝas. Kiam iu formiko estas tro memfida kaj provas sola porti insekto-korpon, unu aŭ du aliaj venas por helpi ĝin.

La gravaj proviantaj kolumnoj estas superrigardataj de gardostarantoj kaj de vicoj de batalistoj, kiuj, plie, glatigas la grundon kaj helpas okaze de akcidentoj. Ili ankaŭ utiligas sian korpon, kiel ponton por ebligi al siaj kunuloj transpaŝi iun fendeton.

Tiuj insektoj havas nur tri sensojn: flaron, guston kaj tuŝon. Ili ne vidas kaj ofte senutile malŝparas energion. Kiam ili renkontas obstaklon, ekzemple mureton, la tuta kolumno transgrimpas ĝin anstataŭ ĉirkaŭiri ĉar ili ne vidas tian eblecon; ili nur flaras la celitan lokon.

La afid-bredistoj estas sovaĝe individuistaj. Ĉiu sin nutras rekte de la afido alkruciĝante ĉe branĉo, neniam helpas kunulon kaj neniam ricevas helpon. Ili malfermas vojon tra la herbaro, mal-embarasas ĝin je obstakloj. Iom post iom la grundo estas ebenigata de la konst-

antaj iroj kaj revenoj de miloj da piedetoj. Male la vojoj uzataj de la karnovoruloj estas multe pli rudimentaj. Kiam temas pri malobstrukcio de vojeto la bredistoj helpas unu la alian. Nu, metu folion trans ilia vojo. Ĉi aŭ kvar formikoj venas kaj kune laboras por puŝi, tiri la obstaklon sur la randon de la vojeto. Povas okazi, ke la folio estas centfoje pli peza ol unu el la laborantoj. Ili tamen sukcesas.

Pli facile estas identigi la reagojn de la du kastoj de formikoj, kiam ili renkontiĝas. Observanto rakontas:

"Iam ni posteniĝis proksime al nesto de bredistaj formikoj apud la vojeto, kiun ili kutime uzis... Subite aperas la malhela kolumno de ĉasistoj. La du vojoj estas kruciĝantaj. La ĉasistoj estas pezaj pro siaj predaĵoj. Ĉiun duan aŭ trian centimetron gardostaras dikaj formikoj montrantaj la minacajn pinĉilojn de siaj mandibloj...Mi vidas du soldatojn proksimajn unu al la alia: unu brediston kaj unu ĉasiston. La bredisto falas de supren kaj kolizias kun la ĉasisto. Sed nenio okazas. Ĉiu retrovas sian vojon. Ili preteratentas unu la alian. La du vojetoj denove kruciĝas iom pli malproksime. La ĉasistoj utiligas folion, kiel ponton nestabilan kaj mallarĝan. La bredistoj pasas sub la ponto. Je unu flanko de la ponteto staras du bredistaj soldatoj. Ĉe la alia staras ok ĉasistoj. Kvazaŭ ĉe landlimo. Mi deprenas la ponto-folion. La ĉasistoj provas trabori la kolumnon de la bredistoj. Ili sukcesas. Ŝiavice la bredistaj soldatoj atakas sed ili fiaskas. Ili provas denove kaj sin ĵetas spronforme kontraŭ la ĉasistoj...

Kaŭrante surgrunde, kun la kamero ĉemane mi observas la liliputan militon. Subite mi faras mispaŝon kaj falas meze de la soldat-svarmoj. Antaŭ ol mi restariĝas mia korpo fariĝas nova batalekampo. Mi sukcesas liberiĝi de la moviĝema svarmego nur ĵetante min en la malvarman akvon de apuda rivereto".

NI DISTRIĜU

Tri amikoj, Pad, Rik kaj Nik estis kondamnitaj resti en karcero dum du jaroj. Sed la juĝisto permesis, ke ili kunprenu ion, kion ili nepre bezonas. Pad elektis belan blondulinon, Rik stokon de viskio-boteloj kaj Nik stokon de cigaredo-paketoj. Post du jaroj, je la elkarceriĝo, aperis Pad kaj la blondulino duondetruitaj, Rik ŝanceliĝanta kaj hikadanta, kaj Nik, kun la stoko de cigaredoj subbrake, krianta, duonfrenezaj "Kial oni ne donis al mi alumetojn " ?

-Stulta drinkejestro fariĝinta senmona, decidis bruligi sian trinkejon kaj pagigi ĝin fare de la asekura kompanio. Li disverŝis benzinon sur la planko, ekflamis alumeton kaj ĵetis ĝin en la salonon. La tuta konstruaĵo brulis kaj kolapsis. Li vokis la policistojn, kiuj skribis raporton. La drinkejestro rakontis al ili strangan okazaĵon: " Freneziga gorilo kaŭzis la incendion. En la policejo li ripetis la rakonton. Iu el la policistoj, scivolema, demandis: " Vi parolas pri gorilo sed laŭ la priskribo ŝajnas, ke temas pri paviano. Provu memori". - " Mi ne povas esti certa, ĉar, kompreneble, ĝi surmetis maskon".

Pat volas diri al sia sesjara filo, ke lia patrino atendas duan infanon. Li sidigas la knabon sur siajn genuojn kaj rakontas: " Post kelkaj tagoj venos bela cikonio, kiu flugos super nia domo, plaŭdigante siajn potencajn flugilojn. Ĝi alportos al ni dikan pakaĵon de feliĉo, specialan donacon de la ĉielo". La filo grimacis kaj diris: " Mi esperas, ke tiu stulta birdo ne ĝenos panjon. Ĉu vi scias, ke denove ŝi estas graveda " ?



ĈU VI PAGIS VIAN ABONON ?

PER BANKĈEKO AL: P. BABIN, 17 RUE R. ROLLAND, 85180-LE CHÂTEAU D'OLONNE

AŬ PER POŝTĈEKO AL: P. BABIN NANTES 2 813 61 L

AŬ AL VIA PERANTO (VIDU LISTON SUR LA LASTA KOVRIL-Paĝo)



CORNEILLE, RACINE, MOLIERE

AMIS ŜIN

Kiu do estas tiu sortofavoratino, laŭvice amata de la anoj de la plej fama beletra triopo deksepjarcenta ? Temas pri Marquise Duparc.

Ŝi naskiĝas ĉirkaŭ 1634. Pro ia patro, foiramuzisto, aparta fleksebleco de akrobato ŝin karakterizas kaj siajn perfektajn krurojn ŝi ŝatas montri. Dum la vintro 1652-a, juna aktoro, Duparc laŭnome, kiu apartenas al la migra trupo de JB Poquelin, enamiĝas je ŝi. Li estas aktoro vera. La geedziĝo okazas la sekvantan jaron. En la komenco ŝi estas fidela, sed poste... venos la tentoj kaj subfaloj.

Inter la jaroj 1654 kaj 1658 Molière havigas al si la protektadon de sangoprince; la trupo fariĝas la komediistoj de Mon-sinjoro de Conti kaj iras de la liona regiono al Sud-Francio kaj inverse. Tiam la teatro-arto estas puriĝinta. Instigite de Richelieu, Ludoviko la XIII-a malpermesas, ke oni krude elparolu aŭ elmontru tro krudajn scenojn. Kompense la aktoroj rajtas senrezerve praktiki la profesion komediisto "kapablan senpeke amuzi niajn popolojn for de kelkaj malbonaj okupoj" (tiaj estas la reĝaj vortoj). Notindas, ke Richelieu ludigis teatraĵojn en sia palaco kaj tiuokaze Anne el Aŭstrio nobeligiŝ Corneille.

Printempe 1658, jen la trupo alvenas al Rouen. Marquise nun scipovas teniĝi en la mondumo, kaj ŝia beleco famiĝas. Admirindas ŝiaj " sinteno de imperiestrino kaj vizaĝo de tragediistino". Corneille kaj ŝi interkonatiĝas. Corneille, 52-jaraĝa, patro de sep gefiloj, sombre vestita, presbitero en sia paroĥo, perfekta burĝo spite sian nobeligon. La familianoj lin titolas "la granda Corneille". Ĉiufoje, kiam li eniras teatrejon li estas ovaciita. Kaj tamen li volas rezigni pri teatroverkado pro fiasko de unu el siaj tragedioj. Plaĉus al superintendanto Fouquet lin tiri al si. Por ke li konsentu reenmanigi sian plumon necesas ŝoko kaj ĝi venas de la juna aktorino. Molière kaj ties kunvivantoj vizitas la poeton en lia trabamura domo, ankaŭ la fraton Tomaso en la apuda similstila domo,

ĉar ambaŭ fratoj edziĝis je ambaŭ fratinoj. Oni ankaŭ ŝatas distri sin en la kamparo. Oni travivas ĉarmajn horojn. Kaj Corneille sendas versojn al Marquise (pardonu: al Irida, laŭ la tiama modo). Ĉi lasta petas de li 52 versojn (la versoj estu samnombraj, kiel liaj vivjaroj). Lin teruras la ideo kontentigi ŝin, kiu kondukas kiel vera koketulino. Tamen Corneille rememorigas ŝin pri la fakto, ke post kelkaj jaroj estos ŝi tia, kia hodiaŭ li.

1658: trupa alveno al Parizo. La 24-an de oktobro oni ludas antaŭ la reĝo. Molière estas agnoskata, kiel aŭtoro-komediisto; lin patronas la reĝa frato; li nun disponas je la teatrejo "le petit Bourbon." Kiel en ĉiuj teatrotrupoj ekzistas rivalecoj profesiaj kaj sentimentaj sine de la ludantaro kaj la trupestroj provas sian bonŝancon ĉe siaj dungitinoj nur ke ili estu ĉarmaj. Do post Armande, Marquise...

En 1662 jen Corneille reaperas, sed por adiaŭ:

" Maljunas mi, Irida, senkuraca problemo. Tagon post tago kreskas laŭ horpasad' la premo.

Nur amo resanigas. Sed se ĝi igas min Sentaŭga pli kaj plie en korteg' de virin', Por mi jam venas frukto el mia maljunaĝo: Je via vid' finiĝas konfuzo aŭ malsaĝo. Jam ne plu korobatoj. Jen mia libereco Ĉe viaj allogaĵoj en plena sekureco."

Ho ve! Corneille ekscias pri la ĉagren-porta rivalo, 25-jaraĝa, Racine laŭnome. La juna poeto supozeble ekkonatiĝas kun Marquise okaze de ŝia elstara interpretado en la tragedio "Alexandre". Je Pasko 1668 Marquise forlasas la trupon de Molière por sin dediĉi al la teatro de Racine. Okaze de "Andromaque" ŝi tiel brile sukcesas, ke triumfo tiaspeca ne estis travivita de post "Le Cid". Marquise naskas filinon aŭtune 1667, ĝuste en la tempo, kiam ŝi estas perfekta enkarniĝo de Andromaque.

10-an de decembro 1668: dum la komedio "La Pledantoj" estas ludata en Saint-Germain antaŭ la entuziasma reĝo, Racine, kiel eble plej firme subtenas kaj helpas la mortontan aktorinon (ŝi mortos la postan tagon), dum trans la fenestro li aŭdas la gratulvortojn de siaj amikoj revenintaj el la kortego. Lastmomente pastro vizitas la mortontinon, kiu laŭdeve rezignas pri la teatroarto, necesa kondiĉo por ke ŝi povu repaciĝi kun la eklezio.

POR VIA DISTRO

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H	Ĥ
1	I	N	T	E	L	E	K	T	U	L	O
2	N	E	I	G	I		O	R	L	O	N
3	T	R	E				K	L	I	N	K
4	E	V	A	K	U	I		K	O	A	
5	L	O	J	A	L	E	C	O			F
6	I			H	A	L		T	U	J	A
7	G	E		E	M			O	N	E	C
8	E			A	L	B	U	M		G	
9	N			B	O	A	T	O			F
10	T	A	O		N	I	T	O	N	O	
11	A	L	N	O			L	O	K	U	S

VORTO-ĈENO

Eltrovu la 21 vortojn, kiuj formas ĉenon, tiel, ke ĉiu vorto komenciĝas per la meza silabo de la antaŭa vorto. La unua vorto komenciĝas per la meza silabo de la lasta vorto. Ĉiuj serĉotaj vortoj konsistas el tri dulingvaj silaboj, do el ses literoj. Jen la signifo de la vortoj:

1- Granda urbo en Nord-Italio. 2- Altvalor^{da} mono. 3- Produkti per propra peno. 4- Vitra ujo por vino. 5- Plej alta vira voĉo. 6- Mallonga literatura rakonto. 7- La urbo de Romeo kaj Julieta. 8- Longa amhistorio. 9- Urbo en Sud-Hispanio. 10- Granda lago en Nord-Rusio. 11- Ludo kun 28 tabuletoj. 12- Grandega frukto. 13- Universitata urbo en Belgio. 14- Mortigilo. 15- Filino de filino. 16- Mara rabisto. 17- Manĝata radiketo. 18- Muelita greno. 19- Ruĝa juvelŝtono. 20- Cemento miksit^a kun ŝtonetoj. 21- Flava juvelŝtono.

La divenitajn vortojn oni skribu en la formo de listo, unu vorto sub la alia.

LA VIVO EN GRESILLON

SIMPLA RAKONTO

La voĉo de la kukolo aŭdiĝas fine de la posttagmezo en la parko. Ku ku ! Ku ku ! Ĉiutage, regule, ĝi deziras montri, ke ĝi daŭre regas; ke ĝi trovis novan neston okupotan. Ĝi estas senĝena. Ĝi eniras la hejmon de aliaj birdoj sed eĉ ne frapas je la pordo. "Jen mi. Mi lasas pakajetojn ĉe vi. Ne timu. Nur konservu ilin en varma loko. Ili mem mal-embarasos vin post kelkaj semajnoj. Ĝis !" Tia ĝi estas. Kaj ĉiufoje ĝi diskonigas la novaĵon per daŭra anonco, kiu similas mors-alfabetan mesaĝon. Sed ĉifoje ĝi insistas, insistadas. Ĝian inform-kanton la aliaj birdoj ne plu aŭskultas. Ili konas ĝin jam de longe. Sed ŝajnas, ke la hodiaŭa informo estas grava: la kukolo vere ekscitiĝas. "Kion ĝi krias ?" - "Ĝi parolas pri verdaj homoj". "Homoj verdaj ? Ĉu tiaj eĉ ekzistas ?" - "Kompreneble, ne. Eĉ en la arboj. Kukol mokas nin. Ne aŭskultu." - "Sed ĝi insistas. Ĝi diras, ke kolumbo, kiu nestas en la vilaĝo aŭdis pri tio. Ĝi rakontis al Kukol. Ili venos en la kastelon, kiu estis tiel trankvila ! - "Tie ĉi loĝos verdaj homoj ? Ni renkontos ilin en nia parko ?" - "Ĉu ili ne detruos ĉion ?" La kukolo silentas, ĉar ankaŭ ĝi timas. Li pensas: "Eĉ se ili ne estas malamikoj, ni ne plu estos inter ni..."

Iom post iom noktiĝas. La birdoj nun silentas. Ili pensas, ke ili devos fronti la danĝeron. Kaj nur kuniĝinte ili povos fari tion efike. Malfacile por birdoj profundanime liberamaj. Multaj pensoj interpuŝiĝas en la etaj kapoj. Fine dormemo venkas. La kapetoj fermas siajn kurtenojn. Venas la nokta silento... Ne tute, ĉar aŭdiĝas la akraj kantoj de la grila koruso. Tiuj, kiuj aŭdis la novaĵon diskonigas ĝin. Miloj da voĉoj malserenigas la lunluman vesperon. La sama informo ripetigadas, ĉar, kiel kutime, la griloj ne aŭskultas unu la alian; ili ĉiuj samtempe parolas... Nur la bufetoj klare transdonas la mesaĝon per sia ununota kanto. Ankaŭ ili silentas post tempeto. Ĉesas la informado... Ĉu vere ? Atenta orelo aŭdas kvazaŭ spiran konversacion, interŝanĝon de blovitaj sonoj, kiuj venas de la supro, de la tegmento de la kastelo. Tie, en angulo de defluilo, vidiĝas du blankaj buloj en la mallumo. Kiuj ili estas ? Kompreneble, la du nepartigeblaj amikoj, la strigoj. Ĉu pro kaŝemo, ĉu pro deziro ne vekti la aliajn, ili nur flustre diskutas. Nur flustre sed longtempe. Ankoraŭ ĉinokte ili babilas ĝis nedeca horo !

La birdoj de la parko estas elrevigitaj. La ekcítica informo de la kukolo, antaŭ tri monatoj, estis esperigoplena. Verdaj homoj ! Eble eĉ el alia planedo ! Sed ili similas la aliajn. Ili ne estas monstroj. Ne ovnioj alportis ilin, sed nuraj simplaj aŭtomobiloj. Ili eĉ ne estas verdaj, kiel esperis la pego. Nur steleto verda ili surportas ĉe la jako. El la vilaĝo kolumbo alportis la informon, ke ĉiuj tiuj "neverdaj" homoj venas el diversaj landoj de la vasta mondo kaj ili parolas diversajn lingvojn. Amuze. Sed ĉi tie ili ĉiuj parolas la saman lingvon.

NIA LIBRO-SERVO

AŬKCIO:	Premier manuel	eld. 1928	baza prezo	10 ff.
	Fundamenta krestomatia	eld. Hachette	1933 baza prezo	50 ff.
	Fundamento de Esp.	eld. Anvers	1931 baza prezo	30 ff.



Kien li iras?

Al GRESILLON.
kompreneble!

Ĉu ankaŭ vi?

Petu informojn: ESPERANTO
Kastelo Gresillon. 49150-BAUGÉ

NIAJ PERKORESPONDAJ KURSOJ

POR LA KOMENCANTOJ: Kurso per mem-korekta metodo. Tiu metodo ebligas progresadon adaptitan al la ritmo elektita de la lernanto, kiu, paŝon post paŝo, korektas mem siajn erarojn. Testo-folioj sendotaj al la korektanto ebligas kontrolon. La korektanto tiam atentigas la lernanton pri la lingvaj punktoj ankoraŭ ne bone asimilitaj.

La prezo de tiu kurso estas: 200 fr. fr.

POR LA PRAKTIKANTOJ: por akiri la praktikadon de la lingvo. Ilustrita kurso, tekstoj, gramatikaj rimarkoj, taskoj sendotaj al korektanto.

La prezo de tiu kurso estas: 200 fr. fr.

SUPERA KURSO: De- kaj al-tradukoj, atentigoj pri gravaj gramatikaj punktoj, ĉefaj eroj de la historio de Esperanto. Bona preparado al la Atesto pri Kapableco.

Prezo de la kurso: 150 fr. fr.

NIA LIBRO-SERVO

POR LA PRAKTIKANTOJ: (P. Babin) - Taŭga por paroliĝi progresantojn.
5-a eldono - 35 fr. fr.


GRAMATIKA GVIDLIBRO: modernigita prezento - 50 fr. fr.

PREPARADO AL LA ATESTO PRI KAPABLECO: (A. Ribot) - 3-a eldono reviziita -
Prezo: 30 fr. fr.

GRAMATIKO PER BONHUMORO



POR LA PRAKTIKANTOJ



La vekhorloĝo sonoras: estas la sepa.



Mi vekigaŝ kaj froras miajn okulojn.




Mi ellirigaŝ kaj sidaigaŝ. (eksidaŝ).



Mi gratas mian hararon.




Mi malfermas la kranon; la akvo elfluas.



Mi aj vestoj estas sur la seĝo; mi prenas kaj surmetas ilin.



Mi aj ŝuoj kaj miaj ŝtrumpetoj kuŝas sub la lito.



Mi estas preta; mi iras malsupren al la manĝoĉambro.

PAGO EL LA LERNOLIBRO "POR LA PRAKTIKANTOJ" (5-a Eldono). TIU LIBRO EBLIGAS
AL LA LERNANTOJ IRI PLUJN PAŜOJN AL PRAKTIKA VIVANTA LINGVO.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Librovendejo Kariljono, vzw Doornstraat 22. 2610 Wilrijk Akceptas kreditkartojn - prezo : 600 BEF.

Britujo : Les Hartridge, 74 Devonshire way, Croydon CRO 8 BS (10 pundoj)

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

Germanujo : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10°-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (20.000 liroj).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatiôziši TOKYO-

Jugoslavio : Jelena Andjelkovic, Nova 61/1, YU-11213 Beograd

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalia : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboa (2.800 esk.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

Svislando : Esperanto Perkoresponde, Claude Gacond, strato Chevreuils 14, CH-2300, La Chaux-de-Fonds, PK.23-4669-1 (22 s.f.)

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 02-41-89-10-34